



Karaj geamikoj,  
jen tute konciza AVENO – sen la detalaj informoj pri ekologio, ekonomio, Homaj kaj Bestaj  
Rajtoj, kaj unuopaj verdaj partioj. Bonvolu legi tion sur: [www.verduloj.org/aveno.htm](http://www.verduloj.org/aveno.htm)

AVE kunagadas kun esperanto-organizajhoj, kun verdaj partioj kaj civilsociaj organizajhoj por  
la abolicio de: atomenergio, mortpuno, torturo, diktaturo, korupteco, fanatismo. AVE subtenas  
naturprotektion, biologian agrikulturon, vegetaran nutrajhon.

Dankon, se vi sendis leteron kun informoj kaj aparte se vi ankau sendis la AVE-Kotizon.  
Ampleksajn AVE-NOvajhojn ni dissendas rete semajne & ili trovighas poste sur nia retejo.

### Renkontighoj de AVE:

2013-07 Rejkjavik, Islando, UK de UEA

2013-07 Grezijono, Francio, alternativa Semajno

2013-07/08 Madrido, Hispanio, SAT-Kongreso

### Raportoj

2011-11-04/06 Europa Verda Konferenco, Parizo: AVE  
partoprenis per informtablo.

AVE-anoj partoprenis la tutmondajn kongresojn de la  
Verdaj Partioj Canberra 2001, Sao Paulo 08, Dakar 12

2012-07-28/ 08-04 Grezijono: **Alternativa Semajno**  
kun verd-politika seminario de AVE:

ASo celas kunveni: vegetaranoj kaj bestoprotektant-  
oj, verda kaj ekologia movado, eko-turismo; loghi en la  
kasteleto au sur la kampadejo: [gresillon.org/s2](http://gresillon.org/s2)

Ni diskutis ekologiajn kaj demokratiajn temojn:

9 Argumentoj kontrau la atomenergio (mw)\*1

Klimatoshanghigho kaj la oceanoj (mvh)\*2

Plastajhoj kaj la akvo - videblaj kaj ne-tuj-videblaj

konsekvencoj (mw)\*3, Ekologia Glosaro \*7

Urboj por shanghi la mondon (mtl)\*4

La ekonomiaj krizoj kaj kiel eviti ilin (ml)\*5

AVE, Asocio de Verduloj Esperantistaj (mw)

EDE (emanuel) <http://www.e-d-e.org/>

Piratpartio, Flua demokratio kaj aliaj temoj (mvh)\*6

\*1) [www.verduloj.org/energio.htm](http://www.verduloj.org/energio.htm) > 100 Argumentoj

\*2) Marco van Hulten parolis pri la oceanoj & la tut-  
monda klimato; rakontis pri eksperimento fekundigi la  
oceanon per fero por ke pli da organismoj povus vivi  
tie, por kapti karbondioksidon.

\*3) [www.verduloj.org/dokument.htm](http://www.verduloj.org/dokument.htm) > Ekologio

\*4) Marie-Therese Lloancy prezentis "Urboj por  
shanghi la mondon" André Cazetian estis urbestro de  
Mourenx Nova-Urbo (fondita 1956). Li priskribas la  
mastrumadon de tiu ek-funkcianta urbo en rekta  
kunlaboro kun la novaj enloghantoj, sendepende de ilia  
nacieco; kaj li priskribas la kondichojn por Partoprena  
Demokratio por atingi socialan kunvivadan pacon kaj  
ankau ekologian dauropovecon, kontraste al la  
tendencoj de la nov-liberalismo, kies sola celo estas la  
maksimuma profito. Bone legebla.

106 p. A4, 2 bildoj, 15 Eur, ISBN 978-2-35519-109-1

\*5) Michael Leibman prelegis pri la ekonomiaj  
principoj kaj krizoj de la lastaj du jarcentoj; kaj

prezentis kiel alternativon la Verdian Novan Konsenton  
"Green New Deal": strebi al pli stabile balancita  
ekonomio, kie tamen evoluo povos ekflori. La homa  
populacio povas igi stabila je malgranda diferenco  
inter la plej richaj kaj malrichaj.

\*6) Marco van Hulten prezentis Liquid-Feedback: por  
rekte ligi delegitojn & civitanojn: [piratpartio.org](http://piratpartio.org)

\*7) Ni diskutis pri diversaj terminoj por klare distingi  
inter diversaj nocioj & aferoj, do eviti ambiguecon:

- liven (anstatau maldekstren, ekz-e je biciklado)

- ghendra egaleco (anstatau gea egaleco), kiam temas  
pri la seksoj en la socialaj aferoj

- -enz- pseudosufikso en PMG, sufikso kiu anstatauas  
-il- (au -izil-) aplikado da substancoj au kemiajhoj.

**Pri AVE:** La Asocio de Verduloj Esperantistaj estas  
malgranda Ne-Registara Organiza o. AVE-anoj parolas  
Esperanton kaj estas Verduloj (membroj a  
simpatiantoj de Verdaj Partioj) favoras ekologian,  
socialan, pacan kaj viv-subtenan politikon. AVE  
pensas pri la tuta mondo; niaj membroj agas surloke.  
Niaj semajnaj retmesaghoj enhavas informojn pri  
ekologio, ekonomio, sociaj aferoj; ofte ni petas niajn  
membrojn subskriboj por Civil-Sociaj Organizajhoj  
(CSO/NRO): [verduloj.org/aveno.htm](http://verduloj.org/aveno.htm)

**Historio de AVE:** AVE estis fondita 1984 en Liège  
(Belgio) okaze de la unua renkontigho de la Europaj  
Verdaj Partioj. El la fondintoj: Christopher Fettes  
(redaktoro de AVENO), Jean-Claude Thumerelle,  
(unua sekretario ghis 1991), Maire Mullarney (t 2008),  
W. Guenther, Ute Haas, k.a. 1991 okazis la unua  
europa kongreso de la Verdaj Partioj en Zuriko kun  
interpretado de la chefaj prelegoj en Esperanton fare de  
Claude Piron kaj Farjon de Lagatinerie. Tiam Manfred  
Westermayer transprenis la sekretarion por AVE de  
Emilo Mas. Pli pri la historio de AVE: AVENO 34 .  
AVE ghis nun estas nura reto da homoj, neformala  
asocio, do fakte sen plena demokratio.

Estraro: Manfred Westermayer (sekretario), George  
Sossois kaj Michael Leibman, & kelkaj komitatoj.

**Statistiko 2013-05:** AVE havas ch. 340 membrojn,  
interesulojn kaj abonantojn de nia bulteno Aveno; ch.  
70 el tiuj estas membroj de ia Verda Partio.

**Ni agadas** pere de intershangho da informoj rilate Verdan Politikon (vidu supre), kaj partoprenas kaj partiajn kaj esperantistajn kunvenojn.

**Temoj:** Ekologio, Sociala Justeco, Homaj & Bestaj Rajtoj, Milito kaj Paco, kaj nemilita Konfliktsolvado.

**Diskutoj:** rekte au „Verduloj“ de diskutejo Ipernity

**AVE-anoj tradukas** gravajn tekstojn el/de/por la Verdaj Partioj kaj Verda Movado.

: informo pri kaj **tradukado** de gravaj tekstoj de la Verda Movado- plej multaj sur: [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org)

- **Charto de la Tutmondaj Verduloj, 2012 (Dakar)**

Ekologiaj-Impostoj, Civila Krizo- kaj Konfliktsolvado

- Ghenerala Konvencio pri la Komerco en la Servoj

- Programo de la Europa Verda Partio, 2006

- Verda Nova Konsento (Green New Deal), 2009

- La Verdula Libro de la EP-Frakcio (2004 - 2009)

Deklaracio Europa Federacio de Junaj Verduloj:

[fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto](http://fyeg.org/main/index.php/about-fyeg#esperanto)

- 100 Bonaj Argumentoj kontraŭ la Atomenergio (kun multaj ligiloj al originalaj dokumentoj.

- Plastajhoj en la akvaroj & kemiajhoj en la plastajhoj.

- Ekologio de la Homo – el teoria vidpunkto, J.N.

Sokolev,1996, trad. T. Auderskaja, 51 p, A4, 5 eur

**AVE-Konsiloj:** Efika Uzado de Energio – aktualigita. Nova: pri daŭropova uzado de fekunda grundo.

AVE subtenas la projektaron **Mazingira** (nord-okcidenta Tanzanio) de Mramba Simba en Salama & Ketare: orfojn en la lernejoj, konstruado de dua mezlernejo „Esperanto Secondary School“, kie helpis esperantistoj per manoj (Snorre) kaj finance, ghi nun havas 6 klasejojn por 240 lernantoj.

Agadoj: trinkakvo, biogaso, re-arbarigo, kuiri lignoshpareme, mikrokreditoj, radio-stacio.

Orfoj: Ni kaj aliaj daŭre subtenas unuopajn orfojn (ch. 300 el 800) pagante la lernejakotizon (30 au 50 Euroj jare, en baza respektive meza lernejo).

La **aktuala projekto** temas pri oleopremilo por produkti sun-floran oleon.

**Bonvolu subteni la projektan Mazingira** ghirante al:

IBAN: BE66 0000 2653 3843; BIC: BPOTBEB1 de la Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, 2000

Antwerpen, menciu: Mazingira, temo & via nomo

**Adreso: Mazingira** Community, c/o Mramba Simba Nyamkinda, P.O.Box 51, BUNDA, Tansania, rete: retejo: (de,en,eo,fr,nl) [www.kono.be/mazingira/](http://www.kono.be/mazingira/)

Kaj ni subtenas la projektan **PIEADC** en Kalima, D.R. Kongo, kiun Etienne Katchelewa organizis por reaktivigi agro- kaj fish-kulturadon, kaj agadas por solubra trinkakvo:

[www.kampanasolidareco.weebly.com](http://www.kampanasolidareco.weebly.com)

Eblas subteni ghin per la konto de AVE.

**Pli pri ambau projektoj: [verduloj.org/afriko.htm](http://verduloj.org/afriko.htm)**

**Pri la Verdaj Partioj:** Esperanto Komisiono je la francaj: [lesverts.fr/article.php?id\\_article=645](http://lesverts.fr/article.php?id_article=645)

Germana Verda Junularo pri Esperanto: [ww.gruenejugend.de/nachrichten/98888.html](http://ww.gruenejugend.de/nachrichten/98888.html), kaj en Esperanto: [www.gruenejugend.de/aktuelles/111036.html](http://www.gruenejugend.de/aktuelles/111036.html)

**Verda Europa Fonduso** lanchis sub-pagharon "en aliaj lingvoj". Kutime GEF (Green European Foundation) raportas en la angla - sed pli kaj pli ili vidis, ke ne chiu regas la anglan sufiche bone pro tio aperis tekstoj en aliaj lingvoj: (en) [www.gef.eu](http://www.gef.eu)

**AVE kunlaboras kun:** Verdaj Partioj surloke, regione, tutmonde; SAT, UEA, TEVA, EDE kaj Europa Esperanto-Unio (EEU): [europa.eu/en/chefpagho](http://europa.eu/en/chefpagho)  
Cultura 21: Internacia retejo kiu traktas la kunligitajn temojn daŭripoveco, tutmondigo, kulturo kaj arto. [www.cultura21.net/eo/esperanto-eo](http://www.cultura21.net/eo/esperanto-eo)

**AGENDO 21:** AVE ekde 1998 proponadas amendon de la UEA-Statutoj per la temo "daŭrigeblo" - lau la Pinto-Kongreso pri la tutmonda naturmedio en Rio '92. Jen nur kelkaj gravaj terminoj por nia estonta mondo: (en) resilience = rezistopovo  
(en) sustainability = daŭrigeblo, daŭropovov(ec)o  
(en) subsidiarity = laueble loka memzorgo  
(en) serendipity=prudente akcepti hazardajn informojn

**Kotizi** al la Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE):

Nia jara kotizo estas libervole paginda - propono:

A-Landanoj kaj aliaj „richuloj“: 5+x EUR

Ni scias ke ne chiu povas (trans-)pagi facile.

Eblas letere per monbileteto (EUR, USD, ) au rekte al

la **UEA-Konto de AVE:** „avex-z“ au al la konto de UEA, ekz-e che ING: BIC/SWIFT: INGBNL2A

IBAN: NL72INGB0000378964,

Ne forgesu mencii: ("via nomo" por Konto avex-z)

**Membrigho:** Bonvole membrighi en AVE, chu vi estas membro de iu verda partio au kunlaboranta en la verda movado, chu ne. **Kontribuoj bonvenaj** pere de artikolo kaj kunlaboro en iu Verda Partio au CSO.

Ni preferas koncizan tekston (rtf): cx-ux, ch-u, au NHA: [w3.pagesperso-orange.fr/kavlan/nha/nha.html](http://w3.pagesperso-orange.fr/kavlan/nha/nha.html)

Nia semajna reta **bulteno** AVENO enhavas multajn koncizajn artikolojn – kolektoj estas sur nia retejo.

AVE sekretario: Manfred Westermayer

Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen/Brsg

[ave@verduloj.org](mailto:ave@verduloj.org)

[www.verduloj.org](http://www.verduloj.org)

AVE - la ligo inter Verduloj kaj Esperantistoj

Ni pensas tutmonde &

agas surloke kaj regione.

La bazo de nia sukceso: via kunlaboro.

